**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 50

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Kiu volas panon, ne **d ␣ rl ␣ t ␣** la manon.

**2.** Ĉe tablo li sidis konsumante **b ␣ f ␣ t ␣ k ␣ ␣**, krespojn, benjetojn kaj torton kaj poste al la kelnero estis rivelita la fakto, ke la manĝinto estis nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo.

**3.** Ŝia domo, tre mallarĝa, havanta nur unu **␣ p ␣ rt ␣ r ␣ ␣** al la strato ĉiuetaĝe, aspektis kiel ŝtuparo de fenestroj, aŭ kiel tranĉaĵo de domo sandviĉe inter du aliaj.

**4.** La faldfolio enhavis la tekston de Manifesto 2000 kaj **k ␣ p ␣ n ␣ ␣** por la subskribo, ĝi estis dissendita kun n-ro 3/2000 de la revuo *Esperanto*.

**5.** En la nuna vintra Japanio neĝo dense kovras montarojn, kie ursoj jam ĉesis sian agadon kaj dormas travintre en **gr ␣ t ␣ ␣** kaj kavoj de arboj.

**6.** Oni povas rigardi al la ĵusa kunveno de 15 elstaraj agantoj por Esperanto en Eŭropo kiel al promesoplena **␣ t ␣ p ␣** sur la vojo al pli efika agado.

**7.** Haider proponis, ke la registaro apliku sian vetoo-rajton por **␣ mpl ␣ k ␣** decidojn de la EU.

**8.** La forfikula ino dum la printempo demetas 10-80 ovojn, kiuj estas **␣v␣ l ␣ ␣** kaj proksimume unu milimetron longaj.

**9.** La akvoj de la rivero estas tiel saturitaj de **m ␣ n ␣ r ␣ l ␣ ␣** kaj organikaj restaĵoj, ke ilia koloro fariĝas bruna.

**10.** Oni ĝenerale konsideras la **c ␣ k ␣ n ␣ ␣ ␣** simbolo de feliĉo kaj fekundeco.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Pere de specialaj specioj de **␣ lg ␣ ␣** kaj muskoj la kalcia kaj magnezia karbonato sedimentiĝas en formo de kristaletoj.

**2.** La homoj kaj ĉevaloj sattrinkis kaj plenigis per akvo la sakojn; ili havis sufiĉe da **d ␣ kt ␣ l ␣ ␣** kaj biskvitoj, ĉiuj do estis bonhumoraj.

**3.** Gravajn problemojn kaŭzas sovaĝaj **␣ pr ␣ ␣** en kelkaj vilaĝoj kaj urboj de Slovakio, la bestoj detruas rikoltojn kaj ĝardenojn, dum ili serĉas manĝaĵon eĉ en urborandaj kvartaloj.

**4.** Ripozante en sia bieno fama rusa kemiisto Dmitrij Mendelejev foje vizitis kuirejon, kie lokaj kamparaninoj sortimentis la **f ␣ ng ␣ ␣ ␣** plukitajn en arbaro.

**5.** Stefankarlo ĉiam ŝajnis al mi dio, kiam li sidis ĉe sia skribotablo, kadrita de la alta dorsapogilo de lia **f ␣ t ␣ l ␣**, milde lumigata de la ovala fenestro malantaŭ li.

**6.** La libroj estas kiel **k** ␣ **n** ␣ **kl** ␣ ␣: se oni ekhavis printempe paron da tiuj sendanĝeraj kreitaĵoj, fine de l' somero ili invados la korton, legomĝardenon, kampon kaj apudan boskon.
**7.** La junulo baldaŭ aperis kun granda blanka kruĉo, plena de bona kvaso, kun granda peco da tritika pano kaj dekduo da peklitaj **k** ␣ **k** ␣ **m** ␣ ␣ en ligna telero.
**8.** Laŭ teknika vidpunkto la sekurzono funkcias ĉar ĝi kroĉas nian korpon al la la maŝino, tiel nia propra **m** ␣ **s** ␣ intime apartenas al tiu de la aŭto.
**9.** Iun varman posttagmezon Maria paŝetadis inter la berarbedoj, gustumante ruĝajn, blankajn kaj nigrajn **r** ␣ **b** ␣ ␣ ␣ kaj la plej dolĉajn grosojn.
**10.** Por vendi **t** ␣ **gr** ␣ ␣ oni devas posedi ĝin, ne katon.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

prolet', konversaci', likv', fast', miel', kanal', akt' , start', solidar', pekl'.

**1.** Oni sekvas dieton sufiĉe limigan, forigis laktaĵojn kaj ␣ ␣ **k** ␣ ␣ **t** ␣ ␣ viandon, spite al tio, kolesterolo ne malaltiĝas. Kial?
**2.** La blanka rizkuko simbolas purecon, la staton de la homoj post ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **d** ␣ kaj la viandaĵoj simbolas la plurecon de la homoj.
**3.** Ŝipeto Sergej somere rondveturigas la vizitantojn en la bela insularo kaj ␣ ␣ **n** ␣ ␣ ␣ **r** ␣ de la apuda lagego.
**4.** Tre disvastiĝinta kaj konata ilo, kies funkciado ja baziĝas sur la dilatiĝo kaj kuntiriĝo de ␣ ␣ **k** ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣ pro variado de temperaturo, estas termometro.
**5.** Yassine promenveturis je la aĝo de dek jaroj en aŭtoj, kiuj havis la ŝlosilon en la ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **g** ␣ **l** ␣, kaj pentris grafition sur la murojn de la magistratejo.
**6.** *Brugse Tripel* estas unu el la maloftaj bierspecoj, karakteriza estas ĝia kremeca malto kaj ␣ ␣ ␣ **l** ␣ **c** ␣ gusto, kaŭzata de multe da alkoholo (9,5%), kun refermentado post enboteligo.
**7.** Pemper havis ege bonan memoron, kaj li skribis taglibron; ĉiun matenon li aperis kun ␣ **k** ␣ ␣ **j** ␣, en senmakula vestaĵo kaj brile poluritaj ŝuoj.
**8.** Ankaŭ estis abundeco por la gastronomoj per manĝetoj en la kongresejo, tia etoso stimulis ŝercadon, viglan ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ kaj eĉ filozofiadon: trajtojn treege skotajn!
**9.** Vjetnamaj esperantistoj, montris grandajn favoron kaj afablon al eksterlandaj gastoj, kiuj danke al tio povis plene ĝui la amikecon kaj ␣ ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ ␣ **c** ␣ ␣ kun gastigantaj landanoj.
**10.** Matene mi iom esploris la ĉefan straton, kiu daŭre portas la nomon de la gvidinto de la monda ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **r** ␣ – evidente pro tio, ke la alternativo estus la malnova germana nomo.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La akvujo servis por la irigacio de ducent mil hektaroj, kaj krom tio dum la leviĝo de la rivero ĝi ___ la superfluon de la akvo.

**a.** prosperis **b.** vipis **c.** sorbis **d.** baptis

**2.** La intenco de Luiz Inácio da Silva premi la popolon sub la ___ de forta ŝtato jam estis klare anoncita per pli da impostoj kaj strikta kontrolo super la civitanoj.

**a.** jugo **b.** impulso **c.** evento **d.** materio

**3.** Morto, estante natura ___, ne bezonas ŝoki; ŝokas maksimume ĝia kaŭzo.

**a.** prelego **b.** fenomeno **c.** struto **d.** tuno

**4.** Bush konvinkis pri sia nova strategio ankaŭ la membrojn de NATO, kiu nun ne plu estas nura defenda alianco sed ataka; nova intervena ___ povos ekmiliti ie ajn en la mondo.

**a.** substanco **b.** medicino **c.** rano **d.** trupo

**5.** Juna amatora arkeologo trovis la servicon ĉe Balatono, sed ne taksis ĝin valora kaj kontaktiĝis kun cigano, kiu supozis la trezorojn ___ kaj interesiĝis nur pri la kupra kaldrono.

**a.** maso **b.** stano **c.** malvo **d.** sulko

**6.** La mateno estis bela kaj freŝa; multkoloraj nubetoj kovris la hele bluan ĉielon; eta ___ tremis sur la folioj kaj herboj kaj arĝente brilis sur la araneaj retoj.

**a.** universitato **b.** tunelo **c.** maleolo **d.** roso

**7.** Ned lernis kiel rekoni simptomon de koratako, sed preskaŭ forgesis tion dum la postaj jaroj, ĉar li estas ege sana kaj aktiva, manĝante rekomenditan ___ kaj neniam fumante.

**a.** akcenton **b.** dieton **c.** dornon **d.** eĥon

**8.** Anstataŭ la celita unuiĝinta elektro-merkato, ni konstatis disdividiĝon en ___, malgraŭ la protokolo de Kioto por redukti emisiojn de tervarmigaj gasoj, emisioj tamen plialtiĝis.

**a.** Sindikato **b.** Senato **c.** Kompanio **d.** Eŭropo

**9.** Post kiam lumiĝis, mi iris sudflankon de la insulo, kaj tie kuŝas ___ de ŝipo, tiunokte ĵetita sur la ŝtonegojn.

**a.** akordo **b.** cikatro **c.** ruino **d.** efekton

**10.** Ĉiuj similas unu alian, kiel la homoj, kaj diferencas nur per la mezuroj, kiel ___ homo diferencas de infano.

**a.** plenaĝa **b.** koketa **c.** oblikva **d.** lojala